b) partoprenado en kibernetikaj projektoj de (1) espolorado (antropokibernetika, ĝeneralkibernetika, konstruktkibernetika kaj biokibernetika), (2) reviziado (dokumentada, traduka, terminologia, enciklopedia, scienc-historia kaj filozofia laboroj) kaj (3) instruado (universitata, lerneja kaj popularscienca);

c) kunlaboro kun AIS, AIC kaj aliaj instituciој, kiuj alie flegas la kibernetikon;

d) strebado al fuzio kun kibernetikaj organizaĵoj kun esence la samaj celoj kaj laborkampoj, precipe kun AIC.

§3 TAKIS havas lingvojn (a) *daŭrajn*, (b) *dumtempajn*, (krome uzendajn dum la aktuala laborperiodo) kaj (c) *sideje oficialan*. - Ĉiu daŭra kaj ĉiu dumtempa lingvo estas laborlingvo de la mondkongreso

La *daŭraj lingvoj* estas *ILo* (estante la neŭtrala lingvo uzata de AIC kaj AIS) same kiel la *Angla* (Usona) kaj *Germana* (estinte la precipaj laborlingvoj de la kvin vojigaj „patroj de la kibernetiko": Schmidt, Shannon, v.Neumann, Wiener, Zuse).

La *dumtempaj lingvoj* estas (kondiĉe ke en ili jam ekzistas kibernetika literaturo) la preferata lingvo de la deĵoranta *prezidanto* kaj ĉiu lingvo, kiu estas oficiala en la *urbo de la mondkongreso*, aŭ estas la preferata pensad- kaj laborlingvo de almenaŭ *1/3 de la membroj* komence de la laborperiodo.

La *sideje oficiala* lingvo estas uzata por la komunikado, kiu estas en la lando de la sidejo jure necesa kun la ŝtataj aŭ ŝtate legitimitaj institucioj.

Eventuala regiona sekcio de TAKIS povas alie difini siajn lingvojn, kondiĉe ke ILo estu unu el ili.

§4 (*Membreco, kotizo kaj aliĝo*) TAKIS konsistas el (a) siaj *senperaj, individuaj* membroj, (b) siaj *senperaj, kolektivaj* membroj, (c) siaj *honoraj* membroj kaj (d) la individuaj kaj la kolektivaj membroj de siaj eventuale jure memstaraj regionaj *sekcioj*.

Ĉiu ordinara (ne honora) individua membro pagas jarkotizon fiksitan de la membrarasembleo en la antaŭa kalendara jaro; li rajtas liberiĝi de plua kotizpagado per pago de 25 aktualaj jarkotizoj dum unu kalendara jaro. Ĉiu kolektiva membro pagas la duoblan jarkotizon. Honora membro estas liberigita de la devo de kotizpagado. Ĉiu individua membro ricevadas senpage la oficialan revuon de TAKIS; kolektivaj membroj ricevas du ekzemplerojn.

Ĉiu individuo rajtas aliĝi per simpla deklaro, akompanata de la unua kotizpago kaj de almenaŭ la bazaj informoj demandataj de AIS por aliĝo al ties Internacia Scienca Kolegio (ISK). Se la individua membro ne kontraŭas kaj se ĝi plenumas la formalajn kondiĉojn, TAKIS aŭtomate zorgos pri aligo ankaŭ al ISK liberigante siajn anojn de kroma kotizpagado al AIS. – La aliĝo de scienca asocio, entrepreno aŭ alia institucio kiel regiona asocio aŭ kolektiva membro okazas per interkonsento kun la estraro. – Pro specialaj meritoj koncerne la celaron de TAKIS, la estraro aŭ la membroasembleo povas proklami ajnan individuon „Honora Membro".

La membreco ekŝvebas (a) jarkomence dum kiam ankoraŭ estas pagenda la kotizo kaj (b) se pro gravaj kialoj la estraro tion decidas. La membro, kiu devas esti informita pri la ekŝvebo de sia membreco ene en tri monatoj, rajtas apelacii al la membroasembleo. La membreco ĉesas (a) pro morto aŭ propravola eksiĝo, (b) pro eksigo laŭ decido de la membrarasembleo kaj (c) kiam la membreco ŝvebas jam dum pli ol unu kalendara jaro.

§5 (*Organoj*) La decidrajtaj organoj estas (a) la membrarasembleo (aŭ, kiam TAKIS havos pli ol mil senperajn membrojn, la delegitarasembleo de la regionaj asocioj), (b) la estraro kaj (c) la revizoraro.

§6 (*Membrarasembleo*) La membrarasembleo estas kunvokata de la prezidanto okaze de la mondkongreso okazanta dum lia deĵorperiodo. La alvokilo, kiu devas indiki la tagon, la lokon, la horon kaj la tagordon, estu distribuata kune kun la invito al la mondkongreso kaj afiŝata en la kongresejo. Eksterordinara asembleo devas esti alvokata unu kalendaran monaton anticipe de la prezidanto pro decido de la estraro aŭ pro skriba peto de minimume 20% de la membroj; ĝi povas okazi ankaŭ malcentre, sub gvidado de la ĝenerala sekretario. Ĉiu membro havas unu voĉon, kiun li rajtas skribe delegi al ajna individua membro. – La membrarasembleo *devas* decidi pri ĉio, pri kio ne decidu la estraro aŭ la revizoraro, kaj *rajtas* nuligi ĉiujn decidojn de ĉi tiuj aliaj organoj.

§7 (*Estraro*) La membrarasembleo elektas minimume tri, maskimume sep individuajn membrojn en la estraron. Regiona sekcio havanta pli ol 100 membroj, de kiuj neniu estas elektita en la estraron, rajtas memstare elekti unu kroman estraranon. La elekto okazas por unu deĵorperiodo, kiu konsistas - laŭ antaŭa decido de la membarasembleo - el 2, 3 aŭ 4 kalendaraj jaroj, kies lasta estu la jaro de la sekvanta mondkongreso.

La estraro elektas inter si mem la *prezidanton* kaj minimume du *vicprezidantojn*. Krome estas elektenda *ĝenerala sekretario* kaj *trezoristo*, se necese el inter la individuaj membroj ne elektitaj en la estraron. La estraro zorgu pri la okazigo de la sekvanta mondkongreso, pri la havigo de la oficiala revuo al la membroj kaj la flegado de la membrolisto, pri ĉia korespondado kun la membroj, pri enspezoj kaj elspezoj, pri la kunlaborado kun kolektivaj membroj, eventualaj regionaj asocioj kaj eksteraj institucioj, pri iniciato kaj kunordigado de kibernetikaj projektoj, pri publikaj rilatoj kaj, laŭbezone, pri statutŝanĝoj. La estraro decidu pri la distribuo de siaj taskoj dum sia laborperiodo.

§8 (*Revizoraro*) TAKIS estas kontrolata ekonomie de du revizoroj, elektitaj por la sekvanta laborperiodo fare de la membrarasembleo. Ili ekzamenas la spezkalkulon kaj la bilancon de la estraro, kies kunsidojn ili rajtas ĉeesti. Ili raportas al la membrarasembleo kaj eventuale proponas senŝarĝigon de la estraro.

§9 (*Malfondo*) Se la asocio pro decido de ¾ de la membroj malfondiĝas sen decidi pri alia maniero likvidigi sian havaĵon, tiam ĉi tiu falas al AIS.

(Proponita 1999-12-05 de Prof. Dr. H. Frank)

Cirkulero de Prof. Dr. Helmar FRANK, vicprezidanto de TAKIS, al la membroj

Paderborn, 1999-12-05

Karaj membroj de nia asocio!

Nia 6a kaj ĝis nun lasta kongreso okazis 1993 en Iaŝi (RO). Laŭ mia scio (kiun ne rifutas nia prezidanto Dr.Dan Maxwell) intertempe ne plu okazis membarkunveno, kiu povus elekti novan estraron. Mi do sentas min ankoraŭ vicprezidanto kaj proponas al vi en interkonsento kun la prezidanto, reaktivigi TAKIS en 2000

a) ĉu (prefere) per la ĉiam de ni celita fuzio kun la Association Internationale de Cybernétique (Namur) - ŝanco finfine estos dum la AIC-membrokunveno okazonta plej probable 2000-01-09,

b) ĉu plulabori sola, (1) konservante nian oficialan revuon (GrKG/H) sed ekde 2000 havigante ĝin al chiuj niaj membroj, (2) aktualigante nian statuton laŭ mia supra propono kaj (3) realigonte la 7-an TAKIS-kongreson lige al la 8a Praga Konferenco pri Kibernetika Pedagogio (PKKP8) kaj al la 22a Sanmarineca Universitata Studadsesio (SUS 22), kiuj okazos 2000-06-09/15 en Hradec Králové (= Königsgräz, CZ), kun tiuokaza membrokunveno elektonta novan TAKIS-estraron kaj decidonta pri la sekvonta kongreso kaj pri la membrokotizo.

Se vi pretas resti membro kaj volas, ke mi en interkonsento kun nia prezidanto strebu realigi laŭeble la alternativon (a), alikaze (b), tiam bv. ĝiri kiel membrokotizon por 1999 0,-, kaj por 2000 40 Eŭroj al la konfidenckonto TAKIS (8821960400 ĉe Volksbank Paderborn, BLZ 47260121) de Ins.t f. Kybern. kun celindiko „TAKIS-kotizoj 1999 /2000" ĝis 1999-12-24, aŭ sciigu, ke vi estas subtena membro de AIS kaj volas resti TAKISano sen kroma kotizpago (kiun transprenos por vi AIS). Vi ambaŭkaze ricevos 2000 la revuon GrKG/H. Se vi estas ankaŭ membro de IfK/GKK, bv. sciigi tion kaj ne pagu mem la kotizon 2000 al IfK/GKK, tion faros por vi TAKIS (aŭ AIC, se sukcesos la fuzio). Agrablajn festotagon kaj bonan komencon de la nova jar(mil?)o deziras al vi kaj viaj familioj

via H.Frank

Oficialaj Sciigoj de AIS
Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Laŭjura sidejo en la Respubliko de San Marino
Redaktita en: Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn,
tel.: (0049-/0-)5251-64200, fakso: (0049-/0-)5251-163533

Redakcia respondeco: OProf. Dr.habil.H. Frank Finredaktita: 1999-12-01

Protokolo de la 18-a kunsido de la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS, okazinta la 29-an de aŭgusto 1999/1697 pfR 19:20 h – 19:50 h en Rimini (I) kadre de SUS 21 en Rimini-RSM lige al la 4-a itala studadsesio de AIS.

1. *Formalaĵoj*
Ĉeestis: Frank, Quednau, Tuhvatullina, Ŝilo.
La protokolo de la 16-a kunsido estis unuanime akceptita. Neniu kontestis la laŭordan kunvokitecon kaj (pro voĉdelegoj) la decidpovon. La asembleon gvidis OProf. Frank, informinte ke (pro la eksiĝo) de s-ino Buss la Subtena Sektoro momente estas sendirektora. Protokolis estraranino Tuhvatullina.

2. *Ĝenerala kaj financa raportoj*
Ne okazis pro malĉeesto de la koncernaj estraranoj.

3. *Decidendaĵoj*
Dum kunsido en Berlin oni proponis ŝanĝi AKU-valoron tiel, ke 1 AKU egalu 65 eŭrojn. La propono estis unuanime akceptata. Estrarano Piotrowski estis skribe proponinta prokrasti la elekton de la nova SubS-estraro ĝis sekvanta kunsido en Berlin en novembro 1999. Oni tamen unuanime decidis tuj elekti kaj proponis kiel kandidatojn la ges-ojn Piotrowski, Tuhvatullina, Rukosujev, Wickstöm, Frank, Barandovská-Frank, Chrdle. Ne klaras, ĉu elekti kvin aŭ sep estraranojn. S-ro Quednau proponis elekti ĉiujn sep por la kazo, ke iu el la elektotaj estraranoj malakceptos la postenon. Rezulte ĉiuj sep supre nomitaj kandidatoj estis elektitaj en la estraron. Tri el ili (Wickström, Barandovská-Frank, Chrdle) estu petotaj akcepti*; la aliaj jam anticipe aŭ dum la kunsido akceptis.
Diversaĵoj
La dumviva Subtena Membro kaj iama direktoro de la Subtena Sektoro, D-ro Lothar Weeser-Krell, estu ties Honora Membro.
Rimini 1999-08-29

protokolis *Liana Tuhvatullina*

* Intertempe Chrdle rifuzis, la aliaj akceptis.

Protokolo de la 25a kunsido de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro (la 22a post la oficialigo) de AIS, okazinta en Grand Hotel, San Marino Città (RSM), 1999-09-03/1699pfR, 11:30 h, fine de SUS 21, kun daŭrigo en Humboldt-Universitato Berlin (D), 1999-11-28 / 1699pfR, 9:50 h, kadre de la „Berlina Novembro 1999“ (Stachowiak-simpozio).

1. *(Formalaĵoj)*
La laŭregulareco de la kunvoko, la kvorumeco, ĉeestrajtoj, la protokolo de la 24a kunsido kaj la tagordo ne estis pridubataj.

2. *(Ĝenerala raporto de la Senato)*
Dum la fermo kaj malfermo de SUS 21 la senatanoj estis raportintaj jam aŭ raportontaj.

3. *(Financoj)*
Pro malĉeesto de la trezoristo oni prokrastis la financan raporton, la senŝarĝigon por 1998 kaj la akcepton de buĝeto 1999/2000 al daŭrigo; ĉio ĉi okazis en Berlin 1999-11-28 post la jarkunveno de la asocio portanta la Akademion en Germanio (AIS - Internationale Akademie der Wissenschaften e.V., mallonge: AIS/IAW antaŭe: AIS Deutschland, aktuala mallongigo: IAW[AIS]), kies revizoro ASci. Jarmark estis proponinta la senŝarĝigon.

4. *(Decidoj)*
4.1 Antaŭ ol presigi la tripartan libron pri AIS estu iomete aktualigataj la regularoj.
En la honorregularo estu mallongigata la artikolo 3 pri akademia vestaĵo tiel, ke en artikolo 3.4 estu forigataj ĉiuj indikoj de diferencoj laŭ rango aŭ sekcio. Forfalu la postulo pri portado de talaro kaj pri envestigo dum solenaĵoj, kvankam aliflanke sen ekskludi la eblon daŭrigi la tradicion laŭ la volo de la unuopulo kaj laŭ la realaj ebloj. Estu ekvivalenta al la AIS-kravato kreota koltuko samkolora. La skarpon rajtu porti krom la subtenaj membroj ankaŭ la anoj de la aliaj sektoroj – en la kazo de dumvivaj aŭ honoraj anoj enestu la emblemo de la koncerna AIS-sektoro.

En la regularoj estu forigataj ĉiuj klaŭzoj, kiuj postulas de unupaj anoj preferojn de la lingvoj Angla, Franca, Germana aŭ Itala antaŭ aliaj etnaj lingvoj, aŭ kiuj plivalorigas konon de tia lingvo kompare al aliaj. Tamen restu la oficialaj lingvoj de AIS laŭ artikolo 4 de la statuto, kun prefero de ILo.
En la ekzamenregularo, precipe en artikolo 17.5, same kiel eventuale en aliaj artikoloj de niaj regularoj estu menciite, ke adapta adopto ne eblas en la kazo, ke la klerigejo, de kie la grado estas akirita, estas nek ŝtate agnoskita nek agnoskita fare de AIS per speciala interkonsento, kaj ankaŭ ne en la kazo, ke la koncerna klerigejo ja estas ŝtate agnoskita, sed pro malserioza konduto rilate sciencistajn gradojn ĝenerale malagnoskita fare de AIS.
4.2 La Ĝenerala Asembleo aprobis kiel „Deklaracion de San Marino“ tekston proponitan de la prezidanto (vd. apendicon) en sia kvalito kiel direktoro de la identecofico. La teksto tamen estu konsiderata nur kiel diskutbazo por la Akademia Forumo dum SUS 22, el kiu eventuale povos rezulti reviziota teksto proklamota kiel „Deklaracio 2000“.

5. *(Elektoj)*
5.1 La ĜA decidis, elekti ankaŭ por la deĵorperiodo 2000 – 2003 maksimume naŭ senatanojn, do minimume du vicsenatanojn. Per sekreta voĉdonado estis reelektataj ĉiuj ĝisnunaj senatanoj (t.e. la ordaj profesoroj Fößmeier, Frank, Holdgün, Kiselman [kiu malĉeestis kaj poste malakceptis] Maitzen, Minnaja, Pennacchietti, Quednau kaj Wickström). Por la sekreta elekto de la du vicsenatanoj estis proponitaj la ordaj profesoroj Dr. Angstl, Bociort kaj Roux, de kiuj nur kolego Angstl ĉeestis. Tial kaj pro voĉegaleco oni decidis interrompi la kunsidon, kaj petis la prezidanton informiĝi intertempe pri la kandidatiĝpreteco. Dum la daŭrigo en Berlin la ĜA unuanime elektis ĉiujn proponitojn. Vicesenantanoj do estas laŭvice Roux , Dr. Angstl, Bociort.
5.2 La prezidanto kaj vicprezidanto OProf. Pennacchietti eksciis de advokato Busignani, ke ĉi tiu konservis la protokollibron de la fondokunsido, kiu laŭ la valida leĝo ne servu kiel protokollibro de la ĜA sed de la asocio jure portanta la Akademion en RSM („promotori“). Temu pri malgranda grupo, laŭeble enhavanta la plej aktivajn subskribintojn de la fondodokumento; la plejmulto devas havi sanmarinan ŝtatanecon. La grupo devas elekti propran estraron kaj revizoron kaj sekvi al propra regularo ne identa kun la statuto de AIS. La ĜA esperas, ke la tiel reformenda portanta asocio konsistos el personoj, kiuj bone konas la Akademion kaj kun ĝi laŭeble daŭre kunlaboras, tiel ke ili povu organize subteni ĉiregionajn studadsesiojn. La prezidanto klopodos varbi kiel sanmarinajn „promotori“ la gesinjorojn Mag.h.c. Marina Michelotti (honora direktorino de SubS), Venturini (ambaŭ iamaj subskribintoj), honoran senataninon Fausta Morganti, iaman senatan sekretariinon G.Sammaritani kaj Marco Sammaritani; ekster RSM apartenu al la grupo laŭ la espero de la ĜA la prezidanto mem kiel iama subskribinto, OProf. Minnaja, Duilio Magnani kaj la vicprezidanto. Pro tio, ke ĉi tiu estonte portanta asocio de AIS antaŭ la fino de la kunsido ne jam havis sian revizoron, la ĜA elektis en la laŭstatutan revizoraron post okazinta membrokunveno de AIS/IAW ties reelektitan revizoron ASci. Jarmark, kiel duan revizoron AProf. Dr. Lobin kaj kiel vicrevizoron la longjaran direktoron kaj nunan honoran membron de la Subtena Sektoro, ADoc. Dr. Weeser-Krell dv.SMdAIS.

6. *(Diversaĵoj)*
6.1 SUS 22 okazu kunlabore kun ĈAIS en Hradec Králové (CZ) 2000-06-09/15, SUS 23 kunlabore kun RAIS en Sibiu (RO) proksimume 2000-09-22/30. Oni petas la asocion portantan la Akademion en RSM informi la ĜA dum SUS 22, ĉu kaj kiel SUS 24 povos okazi 2001-09-01/07 denove en (aŭ proksime al) RSM.
6.2 Rilate la daŭrigon de la dumkongresaj studadsesioj, la ĜA kun bedaŭro eksciis, ke la estraro de UEA esence malakceptis la ŝanĝproponojn de la ĝisnuna interkonsento. La ĜA tamen komprenas tion kiel sekvon de la malsamaj celoj, kaj aliĝas al la espero de la UEA-estraro, ke la serio estos daŭrigebla 2000 en Tel Aviv pro disponigo de taŭga salono fare de la LKK kaj pro la programstarigo fare de komuna komitato, tiel ke la rezulton povos senhezite akcepti kaj la AIS-senato kaj la UEA-estraro. La dekanoj de AIS senprokraste proponu al kolego Maitzen IKU-prelegantojn kaj kursgvidantojn.
6.3 La ĜA rekomendas instigi la prezidanton de la internacia semiotika asocio, dv.ISKano ASci Posner, profesoro en TU Berlin, aktivigi la fakaron „ĝenerala semiotiko“ de la humanistika sekcio. Ankaŭ la aliaj sekcioj kaj fakaroj serĉu pli intensan kunlaboron kun fakaj asocioj, i.a. la kibernetika sekcio kun TAKIS (kolektiva membro de la Subtena Sektoro) per instigo al reciproka aliĝo.

Protokolis 1999-12-02: *Frank*

APENDICO:

Deklaracio de San Marino

aprobita de la Ĝenerala Asembleo dum ĝia 25a kunsido la 3an de septembro 1999/1699pfR fine de SUS 21

1 La **Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino** estas *libera scienca institucio,* fondita en la Respubliko de San Marino, por tie kaj aliloke plenumi en internacia kaj interfaka kunlaborado ajnajn laborojn laŭkvalite kaj laŭnivele tipajn por universitatoj kaj akademioj.

2 AIS strebas al *plureco* rilate siajn agadlokojn, instrumanierojn, instrulingvojn kaj sciencajn skolojn.

3 AIS celas *intersubjektivecon* de la scienco sendepende de la vivloko kaj vivtempo, de la raso kaj klaso, de la religiaj kaj politikaj konvinkoj, de la aĝo kaj sekso, de la ŝtataneco kaj nacia lingvo, kiujn havas la unuopa scienculo propraaŭtoritate pensanta.

4 AIS konsciiĝas pri la *grava rolo de lingvo por la sciencaj pensado kaj komunikado*, kaj aprobas la konvinkon esence jam esprimitan de Cartesius, ke por tiu rolo neŭtrala lingvo, konscie evoluigita laŭ principoj de precizeco, koncizeco kaj lernfacileco, plej problable taŭgas pli (kaj certe ne malpli) ol historie evoluinta nacia lingvo, eĉ se ĉi tiu estus disvastigita tra la tuta mondo per militista perforto, ekonomia delogo kaj politika interkonsento.

5 AIS postulas de ĉiuj studantoj kaj studintoj, ke ili ankaŭ *en la sfero scienca pluflegu sian propran etnan (nacian) lingvon*, evitante *kaj* lingvo-defetismon (laŭ kiu la propra lingvo ne plu estus savebla), *kaj* lingvo-ŝovinismon (kiu ignoras la saman uzad-indecon de aliaj lingvoj pli aŭ malpli disvastiĝintaj ol la propra), *kaj* lingvo-utopismon (laŭ kiu transnacia komunikado respektanta lingvan samrajtecon de la diversaj nacioj plenkontentige eblus jam per aliaj rimedoj solaj, sen bezono de neŭtrala lingvo).

6 AIS komprenas sian ekziston kiel realigon de la revo de Comenius pri internacia scienca kolegio, kiu uzu interlingvistikan planlingvon por sia transnacia interkompreniĝo kaj kunlaboro. Pro *sia scienca aplikado de la Internacia Lingvo planita de Zamenhof laŭ raciaj principoj* kaj pro la prefere almenaŭ *dulingva verkado inkluzivanta ĉi tiun planlingvon*, AIS taksas sian laboron eĉ pli altnivela ol tiun de sciencaj institucioj laborantaj *nur* en iu ajn nacia lingvo.

7 AIS pretas *kunlabori sur la bazo de reciproka respekto* kun ajna alia scienca, teknika aŭ arta akademio aŭ universitatnivela klerigejo (ĉu ŝtata, ĉu ŝtate agnoskita, ĉu agnoskita kiel samranga fare de AIS) supozante ĝis eventuala kontraŭa evidentiĝo, ke tia partnero ne malutilas al la komune flegataj sciencaj, teknikaj aŭ artaj laborkampoj pro alitipaj principoj ol tiuj reliefigitaj en ĉi tiu deklaracio.

Protokolo de la 41-a senatkunsido (35a post la oficialiĝo de AIS fare de la Konsilio de XII, 44a post la fakta eklaboro) okazinta dum SUS 21 en ĉambro de la paroĥejo en Rimini-San Giuliano Mare (I) dimanĉon, 1999-08-29/1698pfR, 14:30 – 17:30 h kun daŭrigoj ĝis 1999-11-28 en Berlin, 15:30 h fine de la „Berlina Novembro" (Stachowiak-Simpozio).

Ĉeestis la senatanoj Frank (en Rimini kaj Berlin), Holdgrün, Lewoc, Maitzen, Minnaja, Pennacchietti, Quednau (en Rimini) kaj Wickström (en Berlin).

0. *Formalaĵoj.*

Ne estis ŝanĝproponoj de la protokolo de la 40-a kunsido (vd. GrKG/H 40/3, sept. 1999, pj 141 - 142.

1. *Decidoj*

Pro tio, ke neniu kandidatiĝis por SUS 21 ne necesis starigi ekzamenkomitaton kaj ekzamenkomisionojn.

La Premion Pirlot ricevu la terminologia verkaro de OProf. Dr. Wim deSmet.

La Akademia Forumo antaŭvidita kun la partopreno de S-ro Pagano pri ties projekto 2020 pro lia nealveno okazu kiel interna interkonsiliĝo pri la temaro tuŝita de ĉi tiu projekto.

La prezidanto alvoku, se la kondiĉoj estas jam plenumitaj kaj la alvoko ne jam okazinta, en pli altan rangon, nome kiel plenrajtajn membrojn (OProf.) aŭ kiel asociitajn profesorojn, la ISKanojn Albano, Dr. Angstl, Dr. Bormann, Eichhorn, Korĵenevskaja, La Torre, Makabe, Ŝejpak, Ŝljapin, Urueña Alvarez. La prezidanto petas la dekanojn aŭ iliajn kunlaborantojn en la koncernaj sekcioj helpi en la kontrolo de la plenumiteco de la kondiĉoj kaj verki po malmultajn liniojn por la aktoj, kiuj reliefigas la sciencan kaj personan indecon.

2. *Invito al la Ŝtata Sekretario pri Publika Instruado kaj Kulturo.*

La Senato konstatas la gravecon de korektaj rilatoj al la registaro de San Marino, kvankam la scienca laboro de la Akademio estas tute sendependa de ajna politika influo el la Respubliko de San Marino aŭ el alia lando. Oni akceptas unuanime la inviton je interparolado, kiu okazis en San Marino lundon posttagmeze, la 30an de aŭgusto.

3. *Diversaĵoj.*

La Senato konfirmas la okazigon de SUS 22 kunlabore kun ĈAIS dum pentekosto 2000 en Hradec Králové (CZ) kaj de SUS 23 kunlabore kun RAIS en la lasta septembra semajno 2000 en Sibiu (RO). Studadsesion en Rimini/San Marino oni ne okazigu 2000 sed ja 2001, post restrukturigo de la loka portanta asocio („promotori") laŭ la ŝanĝita leĝo de RSM pri asocioj.

La ĝisnuna trezoristo provizore daŭrigos sian laboron ĝis la distribuo de la taskoj en la nova senato. La ĝisnuna prezidanto retpoŝte faros antaŭ la fino de decembro sugestojn al la nova senato pri la pliefikigo de la laboro kaj konforma nova disdivido de la roloj, por ke ekde la januaro 2000 ni havu strukturigite funkciantan senaton, kiu estu prezentata per jarfina cirkulero de la nuna (aŭ eventuale jarkomenca letero de la estonta) prezidanto. La ĝisnunaj prezidanto kaj trezoristo renkontiĝos 1999-12-25/26 en Paderborn por finpritrakto de la transdonproblemoj de la agadoj al la nova, 8-persona senato.

Protokolis 1999-12-02:

Frank
prezidanto.

Protokoll zur Mitgliederversammlung der AIS Deutschland e.V. am 22. November 1998 in Berlin, Technische Universität, Elektrotechnik Neubau, Seminarraum EN 191

Beginn 13:11 Uhr, Ende 13:59

Teilnehmer gemäß Anwesenheitsliste, vertretene Institutionen: *Institut für Kybernetik Berlin e. V. / Gesellschaft für Kommunikationskybernetik* durch ihren federführenden Direktor, Professor Dr. phil. habil. Heinz Lohse, sowie *Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung (Europa Klub) e. V.* durch ihren Präsidenten, Honorarprofessor Dr. Siegfried Piotrowski.

Stimmrechtsübertragung: Dr. Axel Assmann auf Prof. Dr. habil. Helmar Frank.

Sitzungsleitung: Professor Dr. habil. Dr. h.c. Helmar Frank .

Protokoll: Siegfried Piotrowski.

T.O.P. 1

Die Beschlußfähigkeit wird nicht angezweifelt Alle anwesenden effektiven und Fördermitglieder sind stimmberechtigt. Das Protokoll der außerordentlichen Mitgliederversammlung vom 21. Februar 1998, veröffentlicht in Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft (grkg/Humankybernetik), Band 39, Heft 1, März 1998 wird einstimmig genehmigt. Mit der Führung des Protokolls wird Herr Piotrowski (Mitglied des Vorstands) beauftragt. Anträge zur Tagesordnung liegen nicht vor, sie wird entsprechend der Einladung vom 31. Oktober 1998 einstimmig genehmigt.

T.O.P. 2

Der Vorsitzende, Professor Dr. habil. Dr. h. c. Helmar G. Frank, berichtet über das ablaufende Geschäftsjahr. Er verweist auf seinen im Februar in Paderborn gegebenen Zwischenbericht und führt ergänzend aus, daß auch 1998 grkg/H als offiziöses Mitteilungsblatt der AIS wieder über alle Aktivitäten berichtet hat und darüber hinaus auch der Europa Klub in seinem Mitteilungsblatt europa dokumentaro. Eine Vorausschau auf die 1999 und 2000 geplanten Aktivitäten schließt sich an.

T.O.P. 3

Der Schatzmeister, Professor Dr. Bengt-Arne Wickström, kann infolge Vorlesungen im Ausland an der Mitgliederversammlung nicht teilnehmen und seinen Kassenbericht 1997 sowie Ausblick auf 1998 und 1999 nicht persönlich abgeben. Daraufhin wird die Sitzung unterbrochen und in der Pause festgestellt, daß der gewählte Kassenprüfer, Professor Dr. Eugen Jarmark, Poznan und Salzkotten, Gelegenheit hatte, in Berlin die komplette Buchführung (Rechnungsbelege, Kontoauszüge und sonstige Unterlagen) einzusehen und stichprobenweise zu prüfen. Es sind keine Beanstandungen vorgebracht worden. Deshalb wurde nach Wiederbeginn der Sitzung Entlastung des Schatzmeisters beantragt.

T.O.P. 4

Herr Piotrowski berichtet, daß das Vereinsgericht in Paderborn die im Februar beschlossene Satzungs-

änderung nicht in allen Punkten genehmigt hat und deshalb ein neuer Beschluß der Mitgliederversammlung gefaßt werden muß. Er legt den Wortlaut des mit dem Vereinsgericht abgestimmten Textes vor und bittet um Verabschiedung der Neufassung.

T.O.P. 5
Die Berichte werden ausführlich diskutiert. Auf Antrag von Dr. Bormann werden der Schatzmeister und die übrigen Mitglieder des Vorstands für 1997 einstimmig - bei zwei Enthaltungen von Vorstandsmitgliedern - entlastet und dem Vorstand, insbesondere dem Vorsitzenden, für seine Arbeit ausdrücklich Dank gesagt.

T.O.P. 6
Die Satzungsänderungen werden diskutiert. Sie werden auf Antrag des Vorsitzenden einstimmig gutgeheißen und genehmigt. Die Neufassung der Satzung wird als Anlage zu diesem Protokoll genommen.

T.O.P. 7
Auf Antrag einiger Mitglieder wird Herr Piotrowski beauftragt, die AIS - Internationale Akademie der Wissenschaften mit einer eigenen Homepage in das www zu stellen. Links zu den bisherigen schwierig zu findenden Seiten sind zu schaffen. Hinsichtlich der Durchführung der 8. Prager Konferenz über Kybernetische Pädagogik ('8. PKKP') wird festgehalten, daß die AIS ihre Vorgehensweise mit dem IfK/GKK abstimmt. Weitere Wortmeldungen liegen nicht vor, so daß der Vorsitzende die Mitgliederversammlung um 13:59 schließen kann.

Paderborn, 1998 - 11 - 22

Siegfried Piotrowski
(Protokollführer)

Protokoll zur Mitgliederversammlung der AIS - Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e.V. am Samstag, 27. November 1999 an der Humoldt-Universität zu Berlin, Gebäude der Wirtschaftswissenschaftlichen Spandauer Str. 1, Raum 125
Beginn 19:05 Uhr, Ende 20:25 Uhr.
Teilnehmer gemäss Anwesenheitsliste, vertretene Institutionen: *Institut für Kybernetik Berlin e. V. / GKK*, durch ihren federführenden Direktor, Professor Dr. phil. habil. Heinz Lohse, sowie *Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung (Europa Klub) e. V.* durch ihren Präsidenten, Honorarprofessor Dr. Siegfried Piotrowski.
Sitzungsleitung: Professor Dr. habil. Dr. h.c. Helmar Frank.
Protokoll: Siegfried Piotrowski.

T.O.P. 1
Die Beschlussfähigkeit wird nicht angezweifelt. Alle anwesenden effektiven und Fördermitglieder sind stimmberechtigt. Das Protokoll der Mitgliederversammlung vom 22. November 1998 wird durch den Protokollführer verlesen und einstimmig genehmigt. Mit der Führung des Protokolls wird Herr Piotrowski (Mitglied des Vorstands) beauftragt. Anträge zur Tagesordnung liegen nicht vor, sie wird entsprechend der Einladung vom 31. Oktober 1999 einstimmig angenommen.

T.O.P. 2
Der Vorsitzende, Professor Dr. habil. Dr. h.c. Helmar G. Frank, berichtet über das ablaufende Geschäftsjahr. Der Bericht ist diesem Protokoll als Anlage beigefügt. Eine Vorausschau auf die 1999 und 2000 geplanten Aktivitäten schliesst sich an.

T.O.P. 3
Der Schatzmeister, Professor Dr. Bengt-Arne Wickström gibt seinen Kassenbericht für 1998 ab und stellt das Budget für 2000 vor. Der Protokollführer verliest den Prüfbericht, den der Kassenprüfer Professor Dr. S. Eugen Jarmark erstellt hat und in dem die Entlastung des Schatzmeisters vorgeschlagen wird.

T.O.P. 4
Die Berichte werden ausführlich diskutiert. Es wird vorgeschlagen, die Neben-Kassen in Bromberg um DM 5.000,-- und in Rimini um DM 4.000,-- zu reduzieren und die Beträge als Festgeld anzulegen. Die ausstehenden Mitgliedsbeiträge sollen angemahnt werden. Das wird der Protokollführer in seiner Eigenschaft als Leiter der deutschsprachigen Fördersektion bei den deutschsprachigen Mitgliedern tun. Entsprechend der Satzung sollen Mitglieder, deren Beitragsrückstände trotz Mahnung 130,-- Euro überschreiten, ausgeschlossen werden. Auf Antrag werden der Schatzmeister, dem Dank für seine Arbeit ausgesprochen wird, und die übrigen Mitglieder des Vorstands - bei eigenen Stimmenthaltungen - einstimmig entlastet.

T.O.P. 5
Die zu T.O.P. 4 gestellten Anträge werden zur Abstimmung gestellt und einstimmig angenommen.

T.O.P. 6
Die Mitglieder diskutieren über die Grösse des Vorstands, der sich aus 3, 5 oder 7 Personen zusammensetzen kann. Auf Antrag wird einstimmig der Beschluss gefasst, dass es bei der bewährten Anzahl von 3 Personen bleiben soll. Es folgen dann die Wahlgänge für den neuen Vorstand. Von den Fördermitgliedern wird allein Herr Piotrowski vorgeschlagen und bei eigener Stimmenthaltung einstimmig gewählt. Im zweiten Wahlgang werden von den wissenschaftlichen Mitgliedern Professor Dr. Frank und Professor Dr. Wickström vorgeschlagen. Die Wahl erfolgt bei eigenen Stimmenthaltungen einstimmig. Die drei gewählten Mitglieder des Vorstands nehmen die Wahl an. Die Mitglieder des Senats, die nicht dem neu gewählten Vorstand angehören, bilden den Beirat. Die beiden Kassenprüfer bestehen aus dem Aufsichtsrat der AIS San Marino.

T.O.P. 7
Weitere Wortmeldungen liegen nicht vor, so dass der Vorsitzende die Mitgliederversammlung um 20:25 schliessen kann.

Berlin, 1999 - 11 - 27

Siegfried Piotrowski
(Protokollführer)

Mitteilungen des Instituts für Kybernetik Berlin e.V.
Gesellschaft für Kommunikationskybernetik

Direktorium:
Prof.Dr. Heinz Lohse, Christianstr. 5, D-04105 Leipzig, Tel.:0341-50017 Federführender Direktor
PDoc.Dr. Vera Barandovská-Frank, Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn, Schriftführerin
Prof.Dr. Siegfried Piotrowski, Schultenhardstr. 27, D-58093 Hagen, Stellvertretender Direktor
Bankverbindung: Konto Nr. 6123037500 bei der Berliner Bank, BLZ 100 200 00 und
Postbank Berlin, Konto-Nr. 477537102, BLZ 100 100 10

Kurzfassung *des Protokolls zur Mitgliederversammlung des IfK Berlin e.V./Ges.f.Kommunikations-Kybernetik 1998-11-22 (Sonntag) 11:00 – 12:07 Uhr TU Berlin. (Das Protokoll wurde durch ein Versehen in GrKG/H 39/4 nicht abgedruckt.)*
Der federführende Direktor, Prof. Dr. Lohse, leitete die Sitzung und gab seinen Geschäftsbericht ab; die Protokollführung übernahm stv. Direktor Piotrowski, der auch den Kassenbericht 1997 vorlegte. Aufgrund des Berichts des Kassenprüfers, Dipl.-Päd. Prof.on. Dr. Lobin, und dessen Antrag wurde der Vorstand bei eigener Stimmenthaltung entlastet. Die Mitglieder des Institutsrats wurden für ein weiteres Jahr einstimmig wiedergewählt. Zu Kassenprüfern für 1998 wurden Dr.habil. V.Barandovská-Frank und Prof.Dr.Lobin gewählt. Abschließend legten der federführende Direktor zusammen mit Prof.Dr.Frank einen Fragenkatalog zu geplanten Maßnahmen 1999 und 2000 vor; er führte zu einer Beratung über weitere Konferenzen (insbesondere über die PKKP8), über die Präsenz im Internet, über den Wiener-Schmidt-Preis und einen neuen, die Organisationskybernetik einschließenden Preis, über den „Club de Namur“ und über mögliche Zentralstellen für kommunikationskybernetisches Schrifttum.

Protokoll zur Mitgliederversamlung des Instituts für Kybernetik e. V./GKK
am 27.11.1999, 20,30 – 21,30 Uhr, im Rahmen des Symposiums „Kybernetische Visionen – (Re)Vision der Kybernetik“, im Raum 125 der Wirtschaftswissenschaftlichen Fakultät, Spandauer Str. 1, 10178 Berlin
Teilnehmer: gemäß Teilnahmeliste.
Tagunsleitung: Prof.Dr.habil. H. Lohse, federführender Direktor
TOP 1: Die ordentliche Mitgliederversammlung wurde form- u. fristgemäß mit Schreiben vom 23.

10. 1999 einberufen, Beschlussfähigkeit und Stimmberechtigung wurden festgestellt, Anträge nicht gestellt und die Tagesordnung einstimmig angenommen.

TOP 2: Als Protokollführerin wurde die Schriftführerin bestimmt.

TOP 3: Das Protokoll der Mitgliederversammlung vom 22.11.1998 wurde vom stv. Direktor Prof. Piotrowski vorgelegt, vorgelesen und einstimmig genehmigt.

TOP 4: Der federführende Direktor gab den Bericht über das Geschäftsjahr 1999 ab. Wichtige Punkte: Unsere Mitgliederzahl ist konstant geblieben. Unser in den GPI-Vorstand kooptiertes Mitglied Prof. Frank hat am 4. 3. 1999 an der Vorstandssitzung der GPI teilgenommen, die sich mit den Vorbereitungen zum Symposium in Wien beschäftigte. Dies fand 24. – 26. 6. 1999 an der Universität Wien statt. Unser Institut vertraten Prof. Frank und Prof. Piotrowski; dieser leitete die Arbeitsgruppe *„Multimedia für die Erwachsenenbildung"*. Beide Teilnehmer hielten Referate im Rahmen des Symposiums. Die *grkg/H* erschienen regelmäßig, *europa dokumentaro* hat uns wieder kostenlos Platz für unsere Mitteilungen zur Verfügung gestellt. Der vom Prof. Piotrowski vorgeschalgene neue Preis für Organisationskybernetik, beschlossen in der Mitgliederversammlung am 22.11.1998, wurde modifiziert und wird am 28. 11. 1999 unserem Mitglied Prof. Dr. H. Stachowiak vergeben. Vorbereitungen und Durchführung des Symposium *„Kybernetische Visionen – (Re)Vision der Kybernetik"* lagen in Händen von Prof. Piotrowski. Die *„Berliner November"* werden wir auch in Zukunft veranstalten und möglichst zusätzlich jedes Jahr ein Kybernetisches Werkstattgespräch. Das erste werden im Jahre 2000 Prof. Piotrowski und Dr. Dittmann organisieren.

TOP 5: Der Kassenbericht 1998 und das vorläufige Ergebnis 1999 wurden vorgelegt. Prof. Lobin verlas seinen Kassenprüfungsbericht für 1998. Wir danken Frau Ehmke für die sorgfältige Kassenführung. Die Berichte wurden nach Diskussion einstimmig genehmigt.

TOP 6: Die Mitgliedsbeitäge werden zu mehr als 85% dafür aufgewandt, dass den Mitgliedern *grkg/H* zur Verfügung gestellt wird. Die finanzielle Situation ist angespannt, da deshalb seit Jahren keine Rücklagen gebildet werden konnten. Prof. Frank soll nach Möglichkeiten suchen, den Bezugspreis von *grkg/H* auf maximal DM 24,-- je Mitglied und Jahr zu reduzieren. Das kann möglicherweise dadurch geschehen, dass zukünftig auch AIC, TAKIS und ggf. andere Organisationen Kosten mittragen oder auch Anzeigen aufgenommen werden. Im übrigen sollen die Mitglieder entscheiden, ob sie *grkg/H* oder ggf. eine andere Mitgliederinformation wünschen. Über eine eventuelle Beitragserhöhung auf ggf. 30,-- Euro kann erst in der Mitgliederversammlung im Jahre 2000 gesprochen werden.
Prof. Piotrowski wird sich um eine Öffentlichkeitsarbeit einschliesslich erforderlicher Internetaktivitäten kümmern. Sollte es zu einer Verschmelzung von AIC und TAKIS kommen, steht das Institut einer Zusammenarbeit mit der neuen Organisation aufgeschlossen gegenüber. Es beansprucht für sich, die europäischen Aktivitäten wahrzunehmen. Der Mitgliederversammlung 2000 werden entsprechend Vorschläge unterbreitet.
Es ist auch zu überdenken, wie sinnvoll es auf Sicht ist, selbständige Sektion der GPI zu bleiben.

TOP 7: Auf Antrag von Prof. Frank wurde der Vorstand einstimmig entlastet.

TOP 8: Als federführende Direktor wurde für die Jahre 2000 – 2001 Prof. Lohse wiedergewählt.

TOP 9: Als stv. Direktoren wurden Prof. Piotrowski und Prof. Lobin gewählt.

TOP 10: Als Mitglieder des Institutsrats für das Jahr 2000 wurden gewählt: Fr. Barandovská (Schriftführerin), Herren Frank, Gunzenhäuser, Lehnert, Marjanović, Stachowiak.

TOP 11: Als Kassenprüfer für 1999 wurden Dr. Barandovská und Herr Marjanović gewählt.

TOP 12: Prof. Frank berichtete über Möglichkeiten der Zusammenarbeit und über bisherige Verhandlungen mit AIC, TAKIS und anderen Institutionen. Über die Ergebnisse werden unsere Mitglieder durch europa dokumentaro informiert werden.

TOP 13: Für 2000 sind PKKP 8 (12. – 14. 6.) in Königsgräz mit kommunikationskybernetischer Preisverteilung (vor allem Wiener-Schmidt Preis) und ein Novembertreffen in Berlin vorgesehen, sowie ein Kybernetisches Werkstattgespräch und mehrere Internet-Aktivitäten.

TOP 14: Über die aus der Aussprache ergebenden Maßnahmen werden wir gegebenfalls in *grkg/H* und in europa dokumentaro informieren.

Zu TOP 15 gab es keine Anträge.

Berlin, 1999-11-27 *Vera Barandovská*
(Protokollführerin)

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.